



## Éva Farkas-Tatár 1924 – 2018

Parolante en Trento 2014



Deguchi-premio en 2015



kun gratulanta rozo en 2014



kun Pavel Polnický 2012



kun 29a pranepo

kun nepino Ágnes  
Ráczkévy-Eötvös



kun Siegfried Krüger 2014

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el  
diversaj landoj kaj per Esperanto  
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume  
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:  
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al  
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj  
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto  
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu preferi pagi al UEA  
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de  
KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale:  
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ  
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke  
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

Karl Barth - influa teologo	123
Prelego al 100 jaroj de ĈEE	125
Eklezio kaj eklezioj: unueco kaj unuigoj	129
Konstruu sesedron kaj vi ne elbrulos	134
Komisiitaj fari pacon	136
Valoraj libroj	137
Nia kongreso en Révfülöp, Hungario	138
Lajos Ordass	139
Membriĝo ĉe KELI	140
Restu, ho anim', en Jesu Krist'	142
Nekrologo - Éva Farkas-Tatár	143
Sciigo el Bet-Leĥem	144

## Redaktoraj vortoj

Peze mi pretigis tiun ĉi numeron de Dia Regno, ĉar okazis sub la ombro de la forpaso de Éva Farkas-Tatár. Kiel “nov-bakita” esperantisto mi renkontis ŝin jam antaŭ longe trapasante Budapeŝt. Tute sen iu ajn supozo ke iam mi estos parto de ŝia granda familio.

Kiam mi surprenis la taskon redakti nian gazeton Dia Regno, ŝi volontulis kontrollegi ĝin. Dum tiuj regulaj interparoloj ni ofte parolis pri la ekvilibro inter bona lingvaĵo kaj persona esprimmaniero. Krome ŝi povis ankaŭ aldoni enhavan kaj teologian vidpunkton al la tekstoj. Tiuj paroloj ĉiam iĝis instruaj lecionoj. Malgraŭ ŝia aĝo kaj kelkfoja malforteco ŝi kun ĝojo daŭrigis tiun laboron ĝis la lastaj numeroj ĉi-jare.

Granda estos la surtera manko al ni ĉiuj. Ŝi ripozu en paco.

(En la Panteono ĉe Edukado.net vi povas legi ŝian propran priskribon en 2011)

# Karl Barth – influa teologo

Leif NORDENSTORM, SE

*Graco devas trovi esprimon en la vivo, alie ne estas graco.*

Karl Barth

**L**a svisa reformita teologo Karl Barth vivis ekde la 10a de majo 1886 ĝis la 10a de decembro 1968. En tiu ĉi jaro do estas 50-jara jubileo de lia morto.

Barth studis teologion kaj en 1909 li fariĝis pastro en germanlingva paroĥo en Ĝenevo kaj poste en Safenwil en norda Svislando. Li konatiĝis kun la sociaj problemoj surloke, kaj li aktiviĝis por la laboristoj de la paroĥo kaj kunfondis la lokan sindikaton. Li fariĝis socialdemokrato.

Barth sentis ke lia teologia eduko estis nesufiĉa. Li dubis ĉu io, kion li diris, vere estis utila al la homoj. Li sentis ke liaj instruistoj estis tro liberalteologiaj, kaj nun konatiĝis kun pli bibliismaj instruistoj. En 1919 eldonejo en Ĝenevo publikigis lian komentarion al la Epistolo al la Romianoj. En 1920 li fariĝis honora profesoro en Göttingen kaj poste en Münster kaj Bonn, ĉiuj en Germanio.

Dum la regado de Hitler kaj la nazioj, Barth fariĝis aktivulo en la kontraŭnazia

Konfesanta eklezio. Li rifuzis montri subtenon al Hitler kaj pro tio devis fuĝi al Basel, Svislando. Post la milito li laboris por demokratia evoluo en Germanio. Li kontraŭis la uzon de atombomboj, kaj en 1957 proponis ke ĉiuj popoloj de la mondo kritiku la uzon de atombomboj kaj en okcidento kaj en oriento. En 1962 li faris longan turneon por prelegi en Usono. En 1963 li estis invitita kiel gasto al la Dua Vatikana koncilio, sed ne povis veni pro malsano. La plej grava verko de Barth estas Kristana dogmatiko, kiu kvankam ĝi atingis 9000 paĝojn, ne estis plenumita, sed eldonita en multaj partoj. En 1968 li fine mortis.




Ne estas tute facile priskribi lian teologion, ĉar ĝi evoluis dum la jardekoj. Iom mallonge ni povas diri ke li emfazis la distancon inter Dio kaj la homo. Li estis kontraŭulo de ideoj ke ekzistus "natura vojo" al Dio per religio, politiko aŭ aliaj homaj aktivecoj. Dio estas io tute alia kaj tial la homo ne povus kompreni Dion, se ne ekzistus Jesuo. Pro Jesuo ni povas havi dialogon kun Dio. Barth ofte uzis la vorton "logoso" (la vorto) por priskribi kiel Dio venis al la mondo kiel Jesuo. La teologio devas havi sian fundamenton en la evangelio en la Vorto de Dio kaj la revelacio de Dio en Jesuo Kristo.

Barth kontraŭis la ideon de Rudolf Bultmann, ke ni devas senmitologiigi la evangelion. Laŭ Barth Jesuo ne estas mito, sed vero. Male la homaj sistemoj (kiel ekzemple naziismo) estas mito.



K Barth dum jarkunveno en Wuppertal en 1956 / Hans Lachmann  
(CC BY-SA 3.0 DE) Bundesarchiv

Barth opiniis ke oni devas ne prediki la saviĝon de ĉiuj homoj, ĉar tio estas ekster la sciuj de la homo. Tamen pro la morto kaj resurekto de Jesuo estas klare ke Dio difinis sian sintenon por la homoj. Ni devas nur akcepti tion per kredo kaj dankemo. ☞



## **Belan kristnaskan feston & Sukcesan novan jaron**



al ĉiu leganto de Dia Regno deziras la sekretario & distribuanto kaj la redaktoro

Pavel POLNICKÝ &  
Bengt Olof ÅRADSSON

Pentraĵo: "Betlema infano" – Jesuo Kristo Savanto de la mondo. Václav Lamr

# Prelego al 100 jaroj de ĈEE

Pavel KLIMEŠ, CZ

**E**n tiu ĉi jaro festas nia Ĉeĥofrata eklezio evangelia cent jarojn de ĝia estiĝo. Ĝi komenciĝis en decembro 1918, nur kelkaj semajnoj post la estiĝo de nova Ĉeĥoslovaka respubliko. Ĝia ekzistado estas tamen tempe kunligita kun komenco de la moderna ŝtato de Ĉeĥoj kaj Slovakoj.

Sed kiu kaŭze tiu ĉi eklezio devenis kaj kiaj estas ĝiaj perspektivoj?

Ni revenu al 14-a kaj 15-a jarcento:

En Bohemujo laboris kelkaj reformaj predikantoj, invititaj al Praha de imperiestro Karolo la IV-a, ekzemple Milič de Kroměříž aŭ Konrad Waldhauser. Ili kritikis problemojn en tiama eklezio.

En Anglujo en tiu tempo predikis simile alia predikanto, John Wycliffe. Liajn pensojn alportis al Praha, kie estiĝis nova universitato, magistro Jeroným Pražský, profesoro en kelkaj okcidenteŭropaj universitatoj. Revoluaciaj pensoj de John Wiclef trovis bonan teron en nova Karola universitato en Praha.

Ĝia rektoro, magistro Jan Hus, granda personeco de nia historio kaj kulturo, serĉis pli bonan kaj pli veran eklezion. Li batalis kontraŭ indulgencoj en tiama eklezio. Post kelkaj jaroj li estis invitita al eklezia koncilo en Konstanz kaj post unujara aresto li estis kiel herezulo la 6-a de julio 1415 brulmortigita.

Tio startis grandan ribelon en Bohemujo kaj por defendo de liaj pensoj estiĝis husana movado. Komencas la epoko de husanaj militoj. Husanoj defendis kontraŭ la tuta tiama eklezio la novan sciaĵon, ke unua eklezio estis malriĉa kaj ke la plena lasta Vespermanĝo de nia Sinjoro estis ne nur en formo de korpo, sed ankaŭ de sango de la Sinjoro por ĉiuj, ne nur por sacerdotoj. Husanoj celebris unue tiun ĉi sakramenton en ambaŭ manieroj, latine “sub utraque”.

Katolika eklezio kaj ĝia papo elsendis en Bohemujon dum 15 jaroj kvin krucajn militirojn, sed vane. Finfine husanaj batalantoj subpremis sin en la jaro 1434. Poste la eklezia koncilo en Basel juĝis por Ĉeĥoj la Vesper-



Pavel Klimeš montras malnovan libron.  
Fotis Bengt O Åradsson

manĝon sub ambaŭ manieroj, kun pano kaj vino, kiel la simbolo de Krista korpo kaj sango.

Sed dum husanaj bataloj estiĝis ia nova kristana movado, kiu rifuzis batali per armiloj kaj kiu volis vivi silente laŭ principoj de la unua eklezio de Kristo. En la jaro 1458 estiĝis en orienta Bohemujo en malgranda vilaĝo Kunvald, la Unueco de gefratoj, nova komunumo de „silentaj en lando“.

Tiu ĉi eklezio trairas en ĉeĥa, poste eŭropa kaj monda spaco ĝis hodiaŭ kiel malgranda, sed misie signifa memstara eklezio Unueco de gefratoj, Unitas fratrum. ĝia moderna centro estas en Herrnhut en Germanujo, kien foriris restoj de ĉeĥaj kaj moraviaj gefratoj post Tridekjara milito el Bohemujo kaj Moravujo.

En mezepokoko kaj frua novepoko en ĉeĥaj landoj faris ĉeĥaj gefratoj tre multe por religio de nacio kaj por ĝia kulturo. En medio de Unueco de gefratoj estis tradukita la unua tuta biblio el originaj lingvoj en ĉeĥan lingvon, kiu estis uzata en niaj landoj pli ol 400 jaroj, preskaŭ ĝis hodiaŭ. Moderna ĉeĥa lingvo havas sian fundamenton en lingvo de Biblio de Kralice (ĉeĥe Bible kralická). La lasta episkopo de malnova Unueco estis signifoplena personeco, Jan Amos Komenský (Comenius), granda eŭropa pedagogo. Li ankaŭ faris fundamentojn de la unua internacia lingvo, simila al Esperanto. Li ankaŭ kiel Zamenhof deziris, ke ĉiuj homoj estu gefratoj.

En la 16-a jarcento ĝis la Tridekjara milito (1618-1648) travivis ĉeĥaj landoj (Behemujo, Moravujo kaj Silezio)

epokon de la granda prospero. Tie ĉi ekzistis liberaj eklezioj – ne nur katolikoj, sed ankaŭ utrakvistoj kaj membroj de la Unueco de ĉeĥaj gefratoj, kiuj akceptis multe de reformacio luterana kaj kalvinana. Precipe Doktoro Martin Luther, kiam li ekkonis pri ĉeĥa martiro Jan Hus, diris, ke li estas ankaŭ husano.

La paco en Westfalen, per kiu finis la Tridekjara milito en 1648, bedaŭrinde signifis por ĉeĥaj landoj malpermeson de ĉiuj konfesoj krom katolika.

Ĉeĥa nobelaro, nekatolikaj predikantoj kaj multaj liberaj urbanoj foriris en eksilon kaj mallibera popolo, kiu estis ligita al tero, restis en sia patrujo. Ekstis malmola rekatolizado. En diversaj lokoj tamen restis inter popolo sekrete nekatolikaj libroj, precipe Biblio de Kralice kaj kantlibroj. Sekrete daŭris nekatolika religia vivo, inkluzive Diservoj.

Tiu ĉi periodo daŭris 150 jarojn. En la dua duono de la 18-a jarcento, ankaŭ sub la influo de protestanta helpo eksterlanda, tiu ĉi subtera movado fortiĝis. En pli multaj apudaj landoj oni rajtas deklari protestantajn konfesojn (Pruslando, Hungario) kaj multaj servutuloj forkuris tien.

En la jaro 1781 la aŭstria imperiestro Josefo la Dua eldonis patenton pri religia toleremo. Ĝi permesis du nekatolikajn konfesojn – aŭgsburgan kaj helvetan. Kondiĉoj por formi evangelikajn komunumojn estis tre severaj. Mankis pastoroj, preĝejoj, lernejoj. Tamen ĉeĥaj evangelikoj tre dankeme akceptis la eldonon de ĉi tiu patenton.

La patenton de religia toleremo

permesis nur konfeson luteranan kaj kalvinan, ĝi ne permesis konfeson de ĉeĥaj gefratoj.

Post la jaro 1781 estiĝis novaj protestantaj komunumoj. Tien apartenis posteuloj de tiuj, kiuj estis ĉeĥaj gefratoj kaj utrakvistoj. Ili konstruis preĝejojn, paroĥajn domojn, lernejojn, ili alvokis pastrojn de eksterlando. Ĝis hodiaŭ estas en nia eklezio multaj familioj kun fremdaj, ekz. hungaraj familiaj nomoj. Komunumoj de aŭgsburga kaj helveta konfeso vivis aparte. La pli granda kunlaboro alvenas post la eŭropa revolucia jaro 1848 kaj post la jaro 1861, kiam ricevis nelkatolikaj konfesoj la samajn rajtojn kiel katolika.



Malnovajn librojn studas Václav Pospíšil, Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Petr Chrdle.  
Fotis Bengt O Åradsson

Originaj komunumoj de ambaŭ konfesoj estiĝis en malgrandaj vilaĝoj en kamparo. Post la egalrajteco estiĝas novaj komunumoj ankaŭ en pli grandaj urboj kaj situacio de protestantoj pliboniĝis. Ambaŭ konfesoj komencas kunlabori, estiĝas gazetoj, en kiuj

publikigis aŭtoroj de ambaŭ konfesoj. Estiĝis la diakonio kaj komence de la 20-a jarcento la societo Kostnická jednota, simila al germana Gustav - Adolf-Werke, kiu zorgas pri helpobezonaj ktp. Kreskas ankaŭ sopiro havi unu komunan eklezion, kiu kreskus ne nur el radikoj de la monda reformacio, sed ankaŭ de nia reformacio ĉeĥa.

Dum la tempo de la unua mondmilito tiuj klopodoj daŭras kaj signifaj teologoj de ambaŭ konfesoj serĉis ĉion, kio nin kunligas – kaj tio estas precipe la komuna historio en malnovaj ĉeĥaj eklezioj.

Tre baldaŭ post la komenco de la memstara Ĉeĥoslovaka respubliko (tio estis la 28-a de oktobro), estis jam je 17-a kaj 18-a de decembro 1918 kunvokita ĝenerala parlamento de ĉeĥaj evangelikoj kaj tie estis fondita komuna eklezio de ĉeĥaj evangelikoj, estis elektita la unua administrado el ambaŭ konfesoj kaj poste la nova eklezio ricevis sian nomon: Ĉeĥofrata eklezio evangelika.

Tia ĉi nova eklezio teologie eliras ne nur el la testamento de la monda reformacio luterana kaj helveta, sed ankaŭ el tradicioj de ĉeĥa reformacio, precipe el testamento de Unueco de ĉeĥaj gefratoj. Jam en la komenco de sia ekzistado ĝi akceptis krome malnovekleziaj konfesoj (Apostolica, Niceokonstantinopolitana kaj Ahtanasia) ankaŭ tiel nomatan Ĉeĥan konfeson el 1575 kaj ankaŭ Augsburgan konfeson kaj la duan helvetan.

Tio ne signifas, ke la teologia fundamento de nia eklezio estas senborda. Tio nur montras, ke ĝi donas al siaj membroj grandan liberon en aferoj de vero kaj

libero. Kiel unu sola regulo de sia vero kaj vivo ĝi rekonas la Dian Vorton rivelatan en Jesuo Kristo kaj atestatan en Sanktaj Skriboj de Malnova kaj Nova Testamento. Ĝi restis portanto de bonaj tradicioj de la ĉeĥa kaj monda teologio. Ankaŭ la unua prezidento de la Ĉeĥoslovaka respubliko profesoro Tomáš Garrigue Masaryk estis ĝia membro.

Kiel ĉiam oni montris, ke ekzistado de la nova moderna eklezio povas esti ankaŭ afero nacia kaj politika. Dank 'al Dio nia eklezio ĝustatempe komprenis, ke tio estas precipe afero spirita kaj religia. En tio helpis al ĝi la unua generacio de bonaj protestantaj teo-

logoj, ekz. J. L. Hromádka kaj aliaj, kiuj trovis sian profundan ankron en biblia sciigo.

Mi kredas, ke nia eklezio havas sian signifon kaj taskon ankaŭ nuntempe, kiam oni diras, ke nia respubliko estas la plej ateista ŝtato en Eŭropo. La valoro de ĉiu eklezio estas ankaŭ en tio, ke ĝi estas la loko de renkontiĝoj. Homoj vivas tre individue. Unu ne konas la alian. La eklezio, kiu vivas per riĉa spirita, kultura kaj komunuma vivo, estas grava por multaj homoj. Mi kredas, ke la Sinjoro ne forlasos la verkon de siaj manoj nek nune nek en estonteco.



## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

### 21. decembro

Dio de ĉiu graco, Via spirito penetru en la plej profundajn kaŝangulojn de mia animo. Nenion mi proprigu al mi, sed mi transdonu mian individuecon al Vi. Akceptu ĝin.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 122).

Tiel Vi subtenos la agadon "Stichting Zienderogen" iniciata de J. Tuinder.





# Eklezio kaj eklezioj : unueco kaj unuiĝoj

Ekumena kongreso, Poděbrady, 2018

Philippe COUSSON, FR

**E**n la unua epistolo de la apostolo Paŭlo al la Korintanoj, unua ĉapitro, ekde la versiklo 10:

*Mi petegas vin, fratoj, per la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi ĉiuj parolu tion saman, kaj ke estu neniaj skismoj inter vi; sed ke vi estu perfekte kunigitaj en la sama spirito kaj en la sama juĝo.*

*Ĉar pri vi, miaj fratoj, estas sciigite al mi de la domanoj de Ĥloe, ke ekzistas inter vi malpacoj.*

*Kaj la jenon mi volas diri, ke ĉiu el vi diras: Mi estas de Paŭlo; kaj mi de Apolos; kaj mi de Kefas; kaj mi de Kristo. Ĉu Kristo estas dividita? ĉu Paŭlo krucumiĝis por vi? aŭ ĉu vi baptiĝis en la nomon de Paŭlo?*

Aŭ en Galatoj, 3:28:

*Vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo.*

Aŭ ankoraŭ la preĝo de la Sinjoro en Johano 17:21:

*Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis.*

Tiujn tekstojn oni povas legi dumaniere: ĝi priskribas la Eklezion kiel ĝi estas aŭ kiel ĝi devus esti.

La respondo al tiu dilemo dependas de la difino, kiun oni donas al la vorto Eklezio mem.

Ĉar tra historio kaj konfesioj oni povas trovi diversajn difinojn de la Eklezio.

La tradicia Reformacia difino, kiu estis tiu de Luther kaj ankaŭ de Kalvino estas: *“La Eklezio estas la kuniĝo de la sanktuloj en kiu la Evangelio estas pure instruata kaj la sakramentoj regule administrataj”*

Por la evangelika parto de protestantismo, la Eklezio estas la kuniĝo de tiuj kredantoj kiuj estas fidelaj al la Biblio kiel lasta aŭtoritato.

Tamen, ambaŭ diras samtempe, ke ne eblas efektive koni la limojn de la Eklezio, kaj parolas pri la nevidebla universala Eklezio.



Philippe Cousson dum prelego.  
Fotis Bengt O Åradsson

Por katolika aŭ ortodoksa kristanismoj, la Eklezio estas difinita per la apostola sinsekvo de la episkopoj, sed krome ligite kun la aliaj episkopoj kaj koncilioj. Al tio, la katolikoj aldonas la neceson estis ligata al la Roma sidejo.

Kelkaj protestantaj eklezioj konservis tiun sinsekvon de episkopoj, sen la ligo al Romo kompreneble.

Kompreneble, ĉiu difino havas siajn limojn. Kio estas pure instruata evangelio kaj regule administrataj sakramentoj? Kiamaniere oni legas la Bibliion? Kiel ĝin interpreti? Ĉu vere la sinsekvo de la episkopoj estis seninterrompa? Ni scias ke ne. Eĉ nek por la Roma sidejo. Kiujn konciliojn agnoski? Ne ĉiuj konsentas. Kvankam referencaj, tiuj ĉi difinoj ne sufiĉas.

Kaj ankaŭ ĉiuj ekleziaj familioj havas komunajn trajtojn. Kaj tio estas tamen logika. Por tio komuna, la Eklezio estas unu.

En la protestanta historio oni povas rapide konstati ke ne ĉio glatas. Estis kaj malakordoj kaj konkordoj, sinsekve kaj samtempe.

Mi citos kelkajn ekzemplojn en la 16a jarcento kaj poste en la 20a.

En 1529 okazis la Kolokvo de Marburg kiu kunigis preskaŭ ĉiuj reformatoroj. Oni tamen devas noti ke ne ĉeestis la anabaptistoj. La partoprenintoj konsentis pri preskaŭ ĉio krom pri la Sankta Manĝo. Zwingli, kiel formulis la holanda Honius, rifuzas la "enpanigon" de Kristo. El la 15 punktoj de la fina teksto, 14 estis konsentoj kaj unu, ĝuste pri la Sankta Manĝo, konstatis la malkonsenton. Oni atribuas al Luther la diron: "Ni ne havas la saman spiriton".

Ene de luteranismo okazis jam en la komenco pluraj kvereloj, ekzemple pri la rolo de la leĝo. Tiuj solviĝis en 1577 per la formulo de Konkordo kaj en 1580 en la libro de konkordo.

Estis pluraj problemoj inter Ĝenevo kaj Zuriko, do ene de la "reformita" familio, ĉefe denove pri la Sankta Manĝo. Kalvino kaj Bullinger, posteulo de Zwingli, alvenis al konsento en 1555, kiun eĉ komprenis Melanchton. Tio estas la Konsento Zurika (Consensus Tigurinus) kiu unuigis la familion.

En la posta periodo dum kelkaj jarcentoj okazis teologia streĉiĝo ene de la diversaj konfesiaj familioj. Reage al tiu fenomeno naskiĝis diversaj movadoj, kiel pietismo, liberalismo, vekigiĝoj.

Kaj alvenis fine de evoluo la 20a jarcento kun la apero de ekumenismo, la reciproka aŭskultado, multaj personaj renkontiĝoj.

---

*Kaj ankaŭ ĉiuj ekleziaj familioj havas komunajn trajtojn. Kaj tio estas tamen logika. Por tio komuna, la Eklezio estas unu.*

---

Inter la rezulto de tiu evoluo estas ekzemple la konkordo de Leuenberg en 1973, kiu arigas luteranajn, reformitajn kaj poste metodistajn ekleziojn, per kiu ili agnoskas dividi la saman fidon kaj deklaras inter si plenan komunion. Oni nun insistas pri tio, kio kunigas kiam en la 16a jarcento oni insistis pri tio, kio disigas. Estas ankaŭ tekstoj de reciproka agnosko kaj de komunio, inter anglikanoj kaj luteranoj, reformitoj, metodistoj.

Tio signifas ke servanto, pastoro de unu el tiuj eklezioj povas senprobleme deĵori en alian, ke ili partoprenas en la Sankta Manĝo de la alia.

Tamen, en ĉiuj ĉi tiuj diskutoj, disputoj, konkordoj kaj malakordoj, oni ĉiam trovas kriterion, kiu estas la distingilo de protestantismo, nome la Sanktaj Skriboj. Argumentoj por disiĝi aŭ por kuniĝi estis ĉiam prenitaj en la Biblio.

En tio helpis la grava protestanta nocio: la universala Eklezio.

En sia ĵusa Deklaro de fido (2017) la Franca Unuiĝinta Protestanta Eklezio diras ke ĝi “estas unu el la vizaĝoj de la unu Eklezio de Kristo”.

La universala Eklezio “konsistas el la aro de la kredantoj, de la instruantoj, de la aŭskultantoj, tiuj nuntempaj, pasintaj kaj estontaj.”

Tiun eklezion oni distingu de la loka komunumo, “la Eklezio kiu estas en...” kiel oni ofte trovas en la Nova Testamento. Same, oni distingu de la nacia aŭ regiona eklezio, kiu estas la kuniĝo de lokaj eklezioj.

Sekve neniu protestanta eklezio diras ke ĝi estas LA Eklezio. Tio logike kondukas al deziro de manifestiĝo de tiu unueco de la Eklezio, ĉar tiel ĝi estas. Kristo ne estas dividita sed la kristanoj disŝiris la korpon en pecoj laŭŝajne. Estas la respondecado de la gvidantoj ke la unueco de la Eklezio estu videbla.

Tamen, oni konstatas ke disvolviĝis eklezioj ne nur laŭ loka aŭ regiona aŭ nacia kadro, sed ankaŭ laŭ konfesia kadro. Kaj ofte la rilatoj estas akraj.

Estis do streboj de kelkaj ne nur manifesti la unuecon de la korpo de

Kristo per reciproka agnosko kaj per kunlaboro, sed ankaŭ per instituciaj unuecoj.

La kolokvon de Marburg instigis unu el la germanaj princoj pro la milita situacio. Li deziris ĉefe pro politiko la unuecon de la reformatoroj, bedaŭrinde kun duona sukceso.

Alia princo volis kaj devige efektivigis unuiĝon inter reformitoj (kiel li) kaj luteranoj (kiel lia popolo). Temas pri eksa Brandenburgo kiu fariĝis Pruslando. En tiu germana princlando la princo estis reformito kaj la plimulto de la loĝantaro luteranoj, kun la notinda escepto de la rifuĝintoj. En 1798 Frederiko Vilhelmo 3-a fariĝis reĝo. Li strebis al la unuiĝo de la protestantoj en siaj teritorioj. La teologo Frederiko Schleiermacher proponis ideojn por konstitucio de tiu eklezio en 1808 kaj la reĝo fine de 1817 estigis la novan eklezion. Sed ne ĉiuj paroĥoj eniris la novan unuiĝintan eklezion, sekve poste kiel oni ofte vidos en aliaj samaj cirkonstancoj anstataŭ du eklezioj estis tri. La afero ne okazis en pacaj kondiĉoj.

Same unuiĝis la eklezioj en kelkaj aliaj germanaj ŝtatoj kaj regionoj.

Samtempaj unuiĝoj okazis ekde fino de la 19-a jarcento en aliaj landoj sed sen interveno de la ŝtatoj, kiel ekzemple en 1918 (antaŭ unu jarcento) en Ĉeĥio, konsistigante la Evangelian Eklezion de la Ĉeĥaj Fratoj. Antaŭnelonge en la fluo lanĉita de la konkordo de Leuenberg okazis tiaj unuiĝoj en Nederlando post la procezo “Kune sur la vojo”, en Belgio, en Francio (2013).

Tute alia tipo de unuiĝo de protestantaj eklezioj instige de la ŝtato okazis

en la 20-a jarcento dum la diktaturo de Mobutu en Zairio, kie ĉiuj protestantaj komunumoj devis ariĝi por konsistigi la Eklezion de Kristo en Zairio. Kiam finis la diktaturon de Mobutu ne ĉesis tiu unuiĝinta eklezio sed daŭris en posta laŭnome demokrata Kongio. La samo okazis pli frue en Japanio dum la militista reĝimo kaj same daŭris post la malvenko kaj la alveno de demokratio.

Dua kategorio estas la unuiĝoj en la daŭro de la 20-a jarcento de, laŭ la kazoj, presbiterianaj, kongregaciaj, metodistaj, “disĉiploj” aŭ aliaj “liberaj” eklezioj en Britio, Aŭstralio, Kanado (unua en 1925) aŭ Usono. Se ne ekzakte el la sama konfesia familio, tiuj eklezioj estas teologie proksimaj.

Kiam en tiuj unuiĝoj enestas anglikanoj, tiam oni parolas pri kvara kategorio, ĉar tiam ĝenerale konserviĝas la episkopa sistemo de la anglikanoj: Suda Hindujo 1947 (la procezo komenciĝis en 1908), Norda Hindujo 1970.

Fine estas kvina kategorio kiam la unuiĝintaj eklezioj kunigas denominaciojn el la sama konfeso (reformita-presbiteriana aŭ luterana) kiuj estis disaj pro historiaj kaŭzoj. Tiu situacio estas ofta en Usono kie okazis disiĝoj sed ankaŭ dividoj laŭ etnaj devenoj.

En kelkaj kazoj, tiuj unuiĝintaj eklezioj asertas ke la procezo ne finiĝis. Tial ili nomas sin “unuiĝantaj” eklezioj, esperante aligi aliajn komunumojn, ekzemple en Aŭstralio.

Ĝenerale la unuiĝintaj eklezioj konservas la ligojn kun la diversaj konfesiaj mondaj organizaĵoj.

Mi jam parolis plurfoje pri Leuenberg. Tie efektiviĝis alia tipo de unueco,

nome la “eklezioj en komunio”. La subskribintaj eklezioj konsistigis ekde 2003 komunumon aŭ komuniojn laŭ la lingvoj. Tio havas fortan signifon. Ili ne konsistigas ĝustasence unu eklezion, sed agnoskas ĉe la aliaj ĉiuj trajtojn kiuj karakterizas parton de la unu Eklezio. Tio kompreneble ne estas indiko ke ekster ili ne troviĝas parto de la unu Eklezio. Inter samspecaj akordiĝoj estas tiu de Bonn 1931 inter anglikanoj kaj malnov-katolikoj kaj tiu de Porvoo 1992 inter anglikanoj kaj skandinavaj luteranoj, por ne paroli pri Meissen 1988 kaj Reuilly 2001.

---

## Ĝenerale la unuiĝintaj eklezioj konservas la ligojn kun la diversaj konfesiaj mondaj organizaĵoj.

---

Unuiĝoj, komunioj, konkordoj estas maniero diri, manifesti la unuecon de la Eklezio de Kristo. Tamen, tio estas nek la celo, nek la fino de la unuecigo de la Eklezio.

Ĝis nun la vidpunkto estas konfesia, institucia, dogma.

Disvolviĝas pli kaj pli, kaj tio havas jam pli forajn radikojn, la post-konfesia kristanismo.

Jam de longe la teologoj de la diversaj ekleziaj akademiaj institucioj laboras kune, tiel ke ofte en konferencoj estas malfacile diveni la konfesion de la preleganto. La ekzegeza esploro trapasas la konfesion. Laborgrupoj kiel la Grupo de Dombes en Francio notinde ekzemplas.

La diakonia aŭ karitata laboro ne atentis pri la doktrinaj limoj kaj postas la amon de Dio al la mondo sen distingo.

La spirita vivo, la preĝgrupoj kaj preĝkomunumoj pli kaj pli preterpasas la konfesiajn kadrojn, kun ekzemploj de Taizé aŭ de la Nova Vojo (Chemin neuf) aŭ de la skota komunumo de Iona.

En multaj landoj ne historie kristanaj, la konfesioj historiaj ne plu validas. En la Misia konferenco de Edinburgo en 1910, origino de la ekumena movado, unu el la rimarkitaj prelegantoj estis unu ĉino kiu laŭdis la trejnajn instituciojn interkonfesiajn. Kaj nun en Ĉinio, iu kristano plejofte ne havas alian konfesion ol kristanismo. Parenteze, en Ĉinio, same en Koreio kaj Japanio, kiam oni parolas pri “kristano”, oni unue pensas pri la protestantoj. La katolikoj estas la katolikoj. Inverse ekzemple en Francio.

Ĉirkaŭ la mondo aperas novaj lokaj eklezioj ekster la konfesia pejzaĝo. Gravus por ili la proklamo de la Evangelio. Ili ankaŭ konsistigas parton de la unu Eklezio, sed konfesia nomo sur la ŝildo, krom Kristo.

Plia kazo de malapero de la konfesiaj limoj troviĝas en la ĥarisma movado, kiu trafenetris preskaŭ ĉiujn konfesiojn. Foje, ĝi eĉ perdis sian signifon kiam estis ŝanĝita la nomo, kaj ne nur la nomo sed la spirito, al Ĥarisma renoviĝo kaj simple al Renoviĝo.

Alia fenomeno estas tiu de la “aperanta eklezio” (emerging church, église émergente) kiu manifestiĝas en la diversaj eklezioj kaj apud ili, kiu sin turnas al la samtempoj por atesti pri la Evangelio per novaj rimedoj, eltrovoj

por kontakti, agi, evangelizi. Tiu “nova evangelizo” okazas ankaŭ inter protestantoj delonge kaj pli kaj pli disvolviĝas. Notinda estas kio okazis en Britio, unue ĉe la anglikanoj kaj poste disvastiĝis.

La nuna konvertiĝo al kristanismo ne plu estas konvertiĝo al tiu aŭ tiu eklezio, sed firme al la Evangelio de Kristo, sperto de renkontiĝo kun Kristo. Pli kaj pli validas la vortludoj ĉirkaŭ angla-lingva formulo “believing and belonging” [kredo kaj aparteno]. Kio gravas estas kredo al Kristo tra persona sperto. Kalvino parolus pri la “interna atesto de la Spirito”. Kio gravas estas aparteno al la familio de Kristo, al la kredantoj, al la unu Eklezio. Sed ne gravas kredo al dogmoj. Ne gravas aparteno al iu konfesia familio. Oni iras tie kie oni sentas sin akceptita, edifita, partoprenanta, sendepende de doktrinoj.

Por fini mi volas citi la konkludon de artikolo mia kiu aperis en Dia Regno kaj kiun mi larĝe uzis:

En nia eta esperantista kristana movado estis kelkaj konfesiaj ligoj, sed mi estas feliĉa ke nia KELI estas de la komenco “unuiginta” kristana asocio. Por ni, Kristo kaj la Skriboj estas nia komuna fundamento, preter niaj diversaj sentoj kaj travivaĵoj.

Kaj mi aldonas tiun diron, kiu relative bone priskribas la konfesian situacion:

- Katolikismo: tre diversaj familioj en unu domo.
- Protestantismo: unu familio en tre diversaj domoj.

Mi kore dankas.

# Konstruu sesedron kaj vi ne elbrulos

Prezentita dum la Ekumena Esperanto-Kongreso en Poděbrady 2018

Elĉeĥigis kaj prezentis: Magdaléna FEJFIČOVÁ (Fejfi), SK

**V**i ĉiuj rigardas al ĉi tiu **vando**. Do ĉi tiu vando estas antaŭ vi, tiu vando estas malantaŭ vi, unu estas laŭ via maldekstra mano, unu estas laŭ via dekstra mano. Por mi tio estas inverse. Tiu estas antaŭ mi, ĉi tiu malantaŭ mi – sed vi ne konsideru min. Ĉi tiu estas antaŭa, tiu malantaŭa, ĉi tiu estas maldekstra, tiu estas dekstra. Plafonon kaj plankon ni havas komunan.

Se mi en tiun ĉi ejon alportos la **kandelon**, kiun mi lumigos – se tiu ejo estos tute senhoma, la fenestroj kaj la pordo estos fermitaj, por ke en ĝi ne estu trablovo – kaj mi starigos tiun kandelon en tiun ejon, ĝi belege flamos. Kaj mi havos certecon, ke ĝi flamos trankvile, ke la flameto belege brulos. Se mi unu vandon forigos, la flamo jam estos endanĝerigita, kaj se mi forigos du vandojn, ekestos trablovo kaj la flamo neniigos.

Simile validas pri la homo. Por ke la homo ne estingiĝu, ke li konstante flamu – kiel diras Jan Werich, iama fama ĉeĥa aktoro: por ke ni ne perdu sian brilon – **oni devas havi ses firmajn vandojn** en la vivo. Kiuj ili estas? Kaj vi nun faru inventuron, kiu vando mankas al vi.

Do, ni devas havi la **unuan vandon**, kaj ĝi estas tio, kio estas **antaŭ ni**. Ni ĉiuj devas **antaŭĝoji pri io**. Ni antaŭĝojas pri tio, kio estas antaŭ ni. Ni devas havi iun perspektivon. Kiam mi venas

en la domon de pensiuloj, ili diras: *'kian perspektivon, kion ĝojigan mi jam povas havi, min jam atendas nur tiu krematorio, nur la tombejo'*. Sed tio estas deprimiga. Memkompreneble, necesas konstante havi ion antaŭ si: antaŭĝoji, kien mi iros somere libertempi; antaŭĝoji, kion mi ricevos de mia edzo okaze de la proksimiĝanta Kristnasko; antaŭĝoji je ...; antaŭĝoji je ...; oni devas antaŭĝoji. Se vi ne havas la antaŭan vandon, kiel ĉi tio, do la flameto de tiu via kandelo estas endanĝerigita.

La **malantaŭa vando** karakterizas en via vivo **la homojn, je kiuj vi povas apogi vin**. Laŭvorte. Oni per la dorso apogas sin malantaŭen. Do, iu devas esti malantaŭ vi, je kiu vi povas apogi vin. La virino devas havi certecon, ke ŝia edzo estas ŝia apogo. La infanoj devas havi certecon, ke la gepatroj estas ilia apogo. Se vi havas neniun en via vivo, je kiu vi povus apogi vin, vi eĉ timas ekrigardi malantaŭen, kiu estas tie – ho, hororo, ke iu povu enpuŝi tranĉilon en mian dorson – do jam mankas al vi du vandoj, sekve la flamo jam estas for. Do, zorgu pri via antaŭa vando, zorgu pri via malantaŭa vando. Kaj ni menciui tiun pluan.

Tio, kio estas laŭ nia maldekstra mano, estas pli proksima al nia koro, ĉar la homo havas la koron en la ĝusta loko, eĉ se li havas ĝin maldekstre. Do, ni havas nian koron maldekstre, do tio ĉi

estas la vando karakterizita pere de niaj geamikoj. Estu edziĝintaj, estu edziniĝintaj, bezonatas ne vivi izolite en tiu geedzeco, kiel en la submarŝipo, sed necesas havi geamikojn. Venu al ni – ankaŭ ni venas al vi! Necesas simple havi iun, al kiu vi venos, kaj tie – el la koro – vi diros al li, kiel kolera vi estas kaj kiel vi koleras pri ĉio. Simple al tiu vi elverŝos vian koron, kiu estas maldekstraflanke; do tia bona amiko, konfesprenanto, kiu lasas viajn vortojn resti ĉe vi, kiel dum konfeso. Gravas, ke vi povas tie elvortiĝi. Do, tio estas la maldekstra vando. Se vi ne havas ĝin, kreu ĝin.

Sekvas la dekstra vando. La dekstra vando estas tiuj en nia vivo, kun kiuj ni kunlaboras. Kun kiuj ni devas kunlabori. Do gravas, ke en tiu laborloko regu bonaj rilatoj. Imagu, ke vi estas instruisto, vi estas en la lernejo, kaj vi ne kunparolas kun iu persono tie; kaj tiu en la lernejo ne kunparolas kun vi; kaj antaŭ tiu persono tie, vi nenion povas diri, ĉar li tion pludirus al la aliaj; pri tiu persono tie vi devas zorgi – do, en tiu instruistejo mankas al vi iel la dekstra vando. Same estas en ĉiu laborejo. Tio estas tiuj labor-rilatoj.

Kaj nun ni havas la plankon. La kandelon ni devas starigi al unu loko, kaj tie ĝi devas stari. Ĉar se mi kuros kun ĝi tien kaj reen – momenteton tie, momenteton aliloke – ĝi estingiĝos dum tiu kurado. Tion ĉi faras amaso da homoj, kiam ili diras: tie mi pli bon-sentos, tio estus pli bona en tiu loko... Ne, tiu ĉi estas mia loko kaj en tiu ĉi loko mi devas firme stari – ĉar ĝi estas



Magdaléna Feifichová dum prelego.  
Fotis Václav Pospíšil

mia loko. Ofte diras al mi junaj patrinoj: *'sciu, mi havas tiujn du infanojn, kaj tio estas nur forno-plato kaj lavmaŝino, kaj iri al la doktoro, kaj kuracpulkoroj kaj temperaturoj, tio estas hororo'*. Kaj mi diras: *'tio ne estas hororo, tio estas la vivo'*! Do, stari firme sur via loko kaj ne rigardi, ke aliloke estus pli bone.

Kaj sekve estas tiu sesa vando, kaj ĝi estas la supra, kaj vidu, kiel ĝi bele lumas. Kaj tio estas tiu lumo de nia vivo. Tio estas la aferoj, kiuj superas nin. Tio estas tiuj animaj valoroj, tio estas kulturo, arto, bono, beleco, vero, kredo, espero, amo. Tiuj estas la valoroj, kiuj plukas el la ĉielo – tial mi simbologigas ilin per la plafono. Se vi do estas sen kredo, sen amo, sen espero, sen beleco, sen kulturo, sen arto, mankas do al vi la supro, kaj plukas al vi, kaj falas la hajlo, kaj la lumo de via kandelo estingiĝos.

Mi deziras al vi, ke vere ĉiu elinter vi havu konstruitan tiun sesedron kaj poste ve! al ĉiu elbruliĝo.

☪

# Komisiitaj fari pacon

Honoré SEBUHORO, DRK

**K**aj ĉio ĉi estas el Dio, kiu per Mesio repacigis nin kun Si kaj kiu konfidis al ni la repacigan servadon. Jes, en Mesio la tutan mondon Dio repacigis kun Si, ne alkulkalante al la homoj iliajn pekojn, kaj al ni Li konfidis la mesaĝon de l' repaciĝo. (2 Kor 5,18-19, /traduko laŭ G. Berveling).

En la unu-ĉapitra libro al Filemono en la Biblio, Onesimo estis sklavo de Filemono, influa membro de la kolosa kristana komunumo. Onesimo forkuris de sia mastro, sed renkontis Paŭlon en la malliberejo en Romo. Li denove naskiĝis tra Paŭlo. Dum li revenis al sia mastro, Paŭlo devis reenkonduki lin al la mastro, por ke la mastro ne traktu lin kiel sklavon, sed kiel fraton en Kristo.

Sklaveco estis normala afero en la grekromia mondo. En tiu epoko, homoj fariĝis sklavoj, se ili estus prenitaj kiel militokaptitoj aŭ fariĝis tiaj ĉar ili vendis

sin en sklavecon. Plej multaj el ili estis bone edukitaj. Ilia traktado estis tre malsama al la traktado de sklavoj en la lastaj tempoj. Estas interese noti, ke plimulto de homoj en tiu epoko estis sklavoj aŭ iam sklavoj.

La sceno de Onesimo kaj Filemono estas la repaciĝo, pardono kaj frateco. La apostolo Paŭlo volis, ke Filemono pardonu al Onesimo kaj ekstrakti Onesimon kiel fraton en Kristo. Kvankam la administrado de repaciĝo, al kiu ĉiu kristano estas komisiita (2 Kor 5,19), gvidas homojn fari pacon kun Dio, ankaŭ, kiel apostolo Paŭlo antaŭe admonis la romanojn, *Vivu, kiom dependas de vi, en paco kun ĉiuj homoj* (Rom. 12,18 /G.B.). Paŭlo volis ke Filemono montru tion per paco kun Onesimo kaj vivu pace kun li (t.e. Onesimo).

Estas kelkaj homoj, al kiuj ni ankaŭ devas pardoni kaj etendi manojn de frateco, kiom ajn ili faris kontraŭ ni. Ĉar ni estas komisiitaj doni la mesaĝon de repaciĝo, ni devas antaŭenigi ĝin ie ajn, kie ni trovas nin. Ni devas paciĝi nin kun homoj ĉirkaŭ ni kaj vivi pace kun ili.

Kion vi bezonas por fari pacon hodiaŭ?

Preĝa Punkto:

*Dio, helpu min ĉiam fari pacon kun aliaj homoj ĉirkaŭ mi.*



Honoré Sebuhero inter infanoj






**K**iam forpasas maljunulo, iu parenco kutime transprenas la taskon malpleniĝi la domon de la mortinto. Se temas pri trovintaj Esperantaj libroj, familiano ofte portas ilin al Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando. Tie laborantoj metas la volumojn en la ĉambron de brokantaĵoj, por povi revendi ilin moder-preze.

Antaŭ unu jaro dum iu bela tago staris en la biblioteko de IEI la tri kutimaj servantoj: Saskia Veen, Pavel Kotovski kaj mi. El ĵus alportinta skatolo de iu mortinto mi fine ankaŭ elprenis la du lastajn samajn librojn. Temis pri romanoj. Mi rekonis nek la aŭtoron "Sinnotte" nek la titolon "Lilio". Ambaŭ estis presitaj en 1918. En IEI ni konservas Esperantajn inkunablojn: nome librojn, presitajn inter 1887 – 1917.

Lilio eĉ ne respondis al tiu regulo. Krome ambaŭ volumoj estis en tiel malbona stato, ke mi bruske diris: *Ni simple forĵetas ilin.*

Lilio: bildo kun artikolo en Esperanto sub la suba kruco N-ro sept 2015.  
<http://aea.esperanto.org.au/>



Edith Alleyne Sinnotte, unua esperanta romanisto virina <http://aktivulo.net/blogo>

Pavel reage diris: *Se vi tiel decidas, mi aĉetas unu ekzempleron.*

Mi miris, *Kial? Ĉar Sinnotte estis en la komenco de la dudeka jarcento la unua Esperantistino en Aŭstralio kaj ŝi stimulis la tutan movadon tie.* Pro tiu klara motivo de Pavel la dua libro krome ricevis lokon en la IEI-biblioteko, ĉar tie ĝi ankoraŭ mankis.

Hejme mi konsultis "Historio de la Esperanta literaturo"-n, el 2016, tiu brilega verko de Minnaja kaj Silber. En ĝi mi inter alie legis pri E. Alley Sinnotte, ke ŝi ĉeestis la UK en Ĝenevo en 1906 kaj renkontis Zamenhof. En 1930 la pionirino vojaĝis al Japanio por konatiĝi kun tieaj samideanoj. Vere atentinda virino.

Kiun enorman eraron mi preskaŭ faris. Mia malĝusta verdikto pri forĵeto montras, ke ni devas esti tre singardaj kun aĝaj libroj. Ne forĵetu ilin. Ankaŭ ne pere de personoj, kiuj pensas, ke ili konas nian literaturon.

# Nia kongreso en Révfülöp, Hungario

10-17 aŭgusto 2019

**M**iaj karaj geamikoj, tutkore mi invitas vin al **Révfülöp**, al bela malgranda vilaĝo (kun ĉ. 1300 loĝantoj) ĉe la norda bordo de Balatono!

La nomo de la vilaĝo havas du partojn: *rév* – signifas pramejo, *Fülöp* (antaŭe Pilip) signifas Filipo, kaj estas la nomo de la 1274 m alta monto, ĉe kies piedo troviĝas la vilaĝo.

La unua skribita mencio estas el 1211, sed jam en la 9a jarcento funkciis pramo, ĉar tie ĉi estas la plej mallarĝa nia granda lago, nur 5,2 km.



Nia kongresejo estos la eduka centro de la hungara luterana eklezio.

La moderna kaj bone ekipita domo havas U-formon – do ĉirkaŭas belan, silentan ĝardenon, kie grandaj arboj donas ombbron. En la ĝardeno estas la luterana preĝejo, kiun ankaŭ la lokaj kalvinistoj uzas.

La centro havas 49 ĉambrojn kun 1-2-3-4 litoj, entute kun 86 litoj. Ĉiuj ĉambroj havas propran banĉambron kaj necesejon.

En la granda konferenca salono povas

sidi maksimume 100 homoj, ĝi estas ekipita per moderna projekciilo kaj laŭtilo. Troviĝas en la domo ankaŭ malgranda kapelo, kaj du malgrandaj salonoj. Sur la teraso komfortaj seĝoj, litoj atendas nin.



La kuirejo povas kuiri laŭ kiu ajn dieto aŭ malsano – ne forgesu signi tiun bezonon en via aliĝilo!

En la koridoroj estas malvarmujoj kaj „mikroondaj”-fornoj je nia dispono. En la domo ĉie estas atingebla WiFi. Apud la domo estas parkejo por 30 aŭtoj.

Per tri-minuta promenado vi povas alveni al la plaĝo de Balatono.

En la 40 km-a ĉirkaŭaĵo de Révfülöp troveblas multaj naturaj kaj konstruitaj valoraĵoj: naturgardita nacia parko, montoj kun belega panoramo al la Balatono, groto kun lago, kasteloj, fortikaĵoj, muzeoj – malfacile mi elektos, kiun mi montru al vi!

Ĉiuj eksteraj kondiĉoj estas pretaj servi nian kunestadon – la internajn kondiĉojn ni mem devas krei laŭ nia elektita temo:

„... mi estis fremdulo kaj vi gastigis min.”

Mateo 25,35

# Lajos Ordass

Nomodonanto al nia kongresjo

**Lajos Ordass** [lajoŝ ordaŝ], laŭ hungarlingve kutima sinsekvo – **Ordass Lajos** – estis hungara pastoro, luterana episkopo. Lia origina nomo estis *Wolf Lajos*.



Lajos Ordass naskiĝis la 6-an de februaro 1901 en Hungara reĝlando en Torzsa (nuntempa Savino Selo en Serbio). Li mortis la 14-an de aŭgusto 1978 en Budapeŝto.

Lajos Ordass frekventis gimnaziojn en Újverbász kaj Bonyhád, kie li faris sian maturecan ekzamenon en 1920. Poste li studis teologion en Budapeŝto, Sopron kaj Wittenberg. Li pastoriĝis en 1924, poste li estis vicpastoro en Harta, Mezöberény, Budapeŝto kaj Soltvadkert. En 1927-1928 li studvojaĝis en Svedio, poste dum du jaroj estis soldata pastoro en Debrecen kaj Budapeŝto. Inter 1931 kaj 1941 li estis pastoro en Cegléd, kaj ekde 1941 en Budapeŝto.

En 1945 li estis elektita episkopo, post du jaroj prezidanto de la nove fondita Tutmonda Luterana Asocio. En 1948 li akre protestis kontraŭ ŝtatiĝo de la ekleziaj lernejoj, kiu estis unu el la plej gravaj kontraŭ-ekleziaj leĝoj/dispo-

noj de la diktaturo. Li estis akuzita per falsaj pruvoj, kaj ricevis kiel puno du jarojn en malliberejo, kaj kvin jarojn perdi la antaŭan postenon.

Post la liberiĝo en 1950 li ne ricevis sian postenon, eĉ li devis silenti.

En 1956, en 5a de oktobro ŝtate kaj 8a de oktobro eklezie oni rehonorigis lin.

Inter 1956-1958 li denove estis episkopo, kaj en 1957 la Tutmonda Luterana Asocio denove elektis lin prezidanto.

Post la hungara revolucio estis superita en 1956, liaj suferoj daurigis. Li estis dum 33 jaroj episkopo, sed nur kvin jarojn li povis esti en vera eklezia servo.

En junio de 1958 oni denove kaj definitive sen-postenigis lin, kaj ĝis la fino de sia vivo li vivis retirite. Dum lia interna ekzilo li multe tradukis el la angla, germana, dana, sveda, norvega kaj islanda lingvoj.

La justicministro de la lasta antaŭ-sistem-ŝanĝa registaro, Kálmán Kulcsár feste kaj oficiale petis pardonon de la vidvino de Lajos Ordass. ☞



Lajos Ordass  
[/https://church.lutheran.hu/reformatio/ppanteon/pp\\_ev\\_ordass\\_lajos.htm](https://church.lutheran.hu/reformatio/ppanteon/pp_ev_ordass_lajos.htm)

# Membrigo ĉe KELI kaj abono de Dia Regno per pago de la kotizo kaj sendo de la adreso al la kasisto

## Kotizoj de KELI 2019

Individua membro (kun Dia Regno)	20,00 EUR
Familia membro (sen DR)	2,00 EUR
Subtenanta membro (kun DR)	30,00 EUR
Dumviva membro (20-obla jarkotizo)	400,00 EUR
Abono DR (sen membreco) pagante rekte al KELI,	16,00 EUR
pagante tra libroservo	18,00 EUR
KELI-anoj rajtas aboni ESPERO KATOLIKA pere de la KELI-kasisto	12,50 EUR
IKUE-anoj rajtas aboni DIA REGNO pere de C.O. de IKUE	10,00 EUR
Aerpoŝta sendado al ekstereŭropaj landoj	2,00 EUR
Adopta Kaso (por ebligi al finance malfortaj membroj ricevi Dia Regno-n)	Donaco

La liga gazeto Dia Regno aperas 6-foje jare

### Pagmanieroj:

1. Pere de landa kasisto/reprezentanto (vidu ĉi sube),
2. Poŝtĝire al **UEA**, Rotterdam, kaj menciu: por KELI-konto **kelk-p**  
konto-numero en Belgio: 000-163 1831-97  
Germanio, Köln: 3182 91 509, BLZ 370 100 50  
Svedio 74374-0  
Svislando (Bulle): 12-2310-0
3. Per via konto ĉe UEA al la KELI-konto: **kelk-p**
4. Per ING BANK en NL al **Universala Esperanto-Asocio**, Rotterdam, menciu:  
por KELI-konto **kelk-p**: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72 INGB 0000 378 564
5. CIC-BANK en Francio por KELI. BIC: CMCIFRPP, IBAN: FR76 1009 6182 45.
6. Per internacia poŝtmandato, adresita al la KELI-kasisto:  
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Klauzál utca 32, HU 1072 Budapest, Hungario;  
☎ +36 302 000 306; ✉ [agnes@raczkevy-eotvos.com](mailto:agnes@raczkevy-eotvos.com)

---

Membrigo ĉe KELI (kaj la nacia sekcio) per la landa  
reprezentanto, kiun vi bonvolu kontakti.

### Landaj kotizoj:

<b>Britio:</b>	15 GBP	
Nacia ĝirokonto n-ro 65 274 0006		Jean Bisset, 47 Airbles Crescent,
“Fellowship of British Christian		Motherwell, ML1 3AP;
Esperantists (FBCE). Kasisto: S-ino		✉ <a href="mailto:jean@bisset100.freeserve.co.uk">jean@bisset100.freeserve.co.uk</a>

- Bulgario** \*)  
 Peranto: S-ino Ivanka Kircheva Stoyanova  
 P.O. Box 701, BG-9000 Varna  
 ☎ + 359 52 639628,  
 ✉ ivanka\_esperanto@abv.bg
- Ĉeĥa Respubliko** 450 CZK kaj
- Slovaka Respubliko** \*)  
 Peranto: Pavel Polnický,  
 Lidická 939/11,  
 CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio,  
 ☎ +420 723 672 335,  
 ✉ polnickypavel@seznam.cz
- Estonio** \*)  
 Peranto: Endel Ojasild, PK. 24,  
 EE-10502 Tallin,  
 ✉ endel.ojasild@gmail.com
- Finnlando** 30 EUR  
 Eblas aboni Dia Regnon uzante landan peranton de UEA aŭ laŭ la pagmanieroj menciitaj sur antaŭa paĝo.
- Francio** 25 EUR  
 CCP n-ro 10 456 15 U Paris,  
 "Franca Evangelia Esperanto-Ligo (FEEL)". Kasisto: Samuel Gaillard,  
 5 rue Maurice Ravel,  
 FR-63800 Courmon d'Auvergne  
 ☎ +33 (0)4 73 84 31 31,  
 ✉ samuel.gaillard@ac-clermont.fr
- Germanio** 24 EUR  
 Evang. Darlehns-genossenschaft  
 Kiel n-ro 47 00 40, BLZ 210 602 37  
 "Esperanto-Liga für Christen in Deutschland e.V."  
 Kasistino: Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-48356 Nordwalde,  
 ☎ 02573 / 626,  
 ✉ hetifisch@googlemail.com
- Hungario** \*)  
 Peranto: Irén Bagi, Baross u.  
 54/B.II.8, HU 1201 Budapest  
 ☎ 01 283 6566
- Nederlando** 20 EUR  
 Vidu sub la pagmanieroj sur la antaŭa paĝo
- Pollando** 20 EUR
- Rumanio** \*)  
 Peranto: Maria László, OF1.C.P.  
 38 Exterior, 4800 Baia-Mare  
 ☎ 062 426182,  
 ✉ laszlo\_maria@yahoo.com
- Slovaka Respubliko** \*)  
 Vidu ĉe Ĉeĥa Respubliko
- Svedio** 20 EUR  
 Pagu al la sveda UEA-konto (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)
- Svislando** 20 EUR  
 Pagu al la svislanda UEA-konto (vidu antaŭan paĝon, punkto 2)
- Usono** 30 USD  
 Oni sendu ĉekon aŭ poŝtmandaton al la peranto: Jerald T. Veit, 3578 S. Taylor, Milwaukee, WI 53207  
 ✉ jeraldveit@yahoo.com
- 
- \*) kotizo laŭ interkonsento kun la peranto

1. Ŝirmo por la pilgrimanto  
estu al mi, Di' Sinjoro!  
Kuraĝigu mian koron,  
renovigu mian forton!

Refreno:

1.-6. Restu, ho anim', en Jesu Krist'!

2. Vi promesis ja kompaton  
kaj indulgon al pekinto.  
Vi forsendis Vian Filon,  
donis al ni novan vivon. Restu, ho anim' ...
3. Vi ne volis, ke pereu,  
kiu fidis al Jesuo.  
La savita tuta mondo  
laŭdu Vin en sia koro! Restu, ho anim' ...
4. Ankaŭ mi al Vi sopiras;  
kvankam vundoj min deformas,  
abomenon Vi formetu  
kaj komplete min purigu. Restu, ho anim' ...
5. Ĝoju, flugu, mia koro,  
rekte al la reĝa trono.  
Dum mi vivas sur la tero,  
Lin mi laŭdas en libero. Restu, ho anim' ...
6. Via suno, Jesu Kristo,  
min prilumu sur la vojo.  
Karan, varman lumon Vian  
ankaŭ mi radiu ĉiam. Restu, ho anim' ...

PAIZSA SZEGÉNY FEJEMNEK • M (Király): © Kálmán Csomasz  
Tóth • hungara T: Imre Pécselyi Király • E: Éva Farkas-Tatár, 1971  
en AK 133 • kun afabla permeso de la komponisto • ↑ Psa 28,7



# Éva FARKAS-TATÁR

23. septembro 1924 – 23. novembro 2018

**K**ion mi volas diri unue aŭdinte la informon pri la forpaso de “Onjo Éva” estas danko, danko al ŝi kaj precipe danko al Dio pro tio, kion ŝi donis al ni, kion ni ricevis de ŝi dum multaj jaroj.

Mi renkontis ŝin kun la edzo en la jaro 1979. Mi estis kore akceptita en ilia apartamento en Dohany utca. Ili montris al mi la urbon, la preĝejon, la lagon Balatono kie mi renkontis kelkajn junulojn el la paroĥo. Poste mi kunportis ilin ambaŭ al Svislando por la Universala Kongreso en Luzern kaj la KELI-kongreso en Bienenberg, kaj ankaŭ ĝis mia franca vilaĝo kaj ĝis la trajno kiu tra Parizo portis ilin hejmen. Laŭ mia memoro, József lernis Esperanton kaŝe de ŝi kaj surprize parolis la lingvon en la kongresoj. Kun mi li unue babilis france.



Éva Farkas-Tatár parolas memore al sia edzo dum lia memortago 2014.

Mi alian fojon restis ĉe ŝi, sed ne memoras ekzakte la daton, ĉiam akceptita kun ĝojo.

Rimarkeblaj estis ŝiaj profunda fido kaj konvinkita ekumenismo. Ŝi lasis fortajn spurojn en Esperanto-medioj en instruado kaj radio-elsendoj en Hungario kaj eksterlande. Tiuj, kiuj partoprenis kristanajn Esperanto-kongresojn kie ŝi estis, ne povas forgesi ŝin kaj ŝian afablecon.

En niaj kongresoj, ŝi gvidis bibliajn diskutojn tre ŝatatajn, sed ankaŭ lingvajn diskutojn. En kongreso kie ŝi ne ĉeestis, Henk de Hoog diris ke la gramatikaj tempoj estis tiam gviditaj de pluraj “adamoj” ĉar forestis Éva.

Mi memoras, kaj ĵus reaŭdis, ŝian voĉon, en klara Esperanto. Notindaj estis kelkaj trajtoj, kelkaj esprimoj tipaj de ŝi: “Esence”, kaj “ĉe ni kutimas diri”. Mi kun emocio reaŭskultas la intervjuon, kiun ŝi donis al Radio Vatikana en 2007\*. Aŭdante ĝin, mi revidas ŝin, kvazaŭ ŝi troviĝus malantaŭ la vitro de la registrejo.

En la alia mondo, kiu venos, kie ne plu estos lingvaj problemoj, ni ne plu diskutos pri teologio, ne plu pri gramatiko, sed ŝi estos partoprenanto kun ni en la ĥoro kiu laŭdos Dion.

*Philippe COUSSON*  
Prezidanto de KELI

\*) [www.radio-vatikana-esperanto.org/elsendo.php?d=2007-05-01](http://www.radio-vatikana-esperanto.org/elsendo.php?d=2007-05-01)

# Sciigo el Bet-Leĥem'

Kristnaska karol-danco  
(originale verkita en Esperanto)



1. Sci - i - go el Bet - Le - ĥem': \_\_\_\_\_
2. Nas - ki - ĝis al ni la Sa - vant'. \_\_\_\_\_
3. In - fa - ne - to en sta - la trog'. \_\_\_\_\_
4. En - kar - ni - ĝis la Vor - to de Di'. \_\_\_\_\_



Sci - i - go el Bet - Le - ĥem': \_\_\_\_\_  
Nas - ki - ĝis al ni la Sa - vant'. \_\_\_\_\_  
In - fa - ne - to en sta - la trog'. \_\_\_\_\_  
En - kar - ni - ĝis la Vor - to de Di'. \_\_\_\_\_



1.-4. Krist - nas - ka so - len! Ho ĝo - jo - plen!



Sci - i - go el Bet - Le - ĥem': \_\_\_\_\_  
Nas - ki - ĝis al ni la Sa - vant'. \_\_\_\_\_  
In - fa - ne - to en sta - la trog'. \_\_\_\_\_  
En - kar - ni - ĝis la Vor - to de Di'. \_\_\_\_\_

*Verku mem aliajn strofojn, ekzemple:*

5. Anĝela kantad' de l' ĉiel':
6. Al Di' en la altoj glor'.
7. Kaj paco al ni sur la ter'.

SCIIGO EL BET-LEĤEM' • KRISTNASKA KAROL-DANCO • M kaj E (originale  
verkita laŭ Luk 2,10-12 kaj Joh 1,14): Albrecht Kronenberger 2017-12-24